# ESPERANTO

**Internacia Revuo eldonata de Universala Esperanto-Asocio**

**1946**

39-a jaro N-ro 497 (5)

Septembro - Oktobro

(Fondita 1904, ne aperis dum 1943-45)

Fondinto: H. Hodler, † 1920

Redaktoro: Hans Jakob
Palais Wilson
Genève, Svislando


ENHAVO:


Je la honoro de la mortintoj 1939—1945 . . . . . . . 33
Niaj mortintoj . . . . . 34—40
Universala Esperanto-Asocio Oficiala Informilo 5 . . . 40
Esperantista Interhelpo . . . 40



Jara abono . . . . Fr. sv. 10.—
(Kun ricevo de la jarlibro & premio)

. . . . . Anonco: . . . . .
Korespondado du linioj . . . 1.—

. . . . . Reklamo: . . . . .
Kolonero unu centimetra . . . 1.—

Poŝtĉeko svisa: Genève I 2310
Poŝtĉeko belga: Bruxelles 184200
Poŝtĉeko franca: Lyon 221-76
Poŝtĉeko sveda: Göteborg 44381

Bokförlaget Kosmos
för Universala Esperanto Asocio


## Je la honoro de la mortinoj 1939—1945

La interkonsento de la du grandaj organizaĵoj finigi la konflikton kaj kunigi la fortojn estas likvidacio de milito interna. Pensante je tio, ni devas ankaŭ likvidi iom post iom okazaĵojn dummilitajn. Inter ili la helpagadon pri Familio Zamenhof instigitan de UEA, la servon de interhelpo, poste la problemon pri morala respondeco de esperantistoj kiuj partoprenis la Nazi-agadon.

Kaj fine ni pensu je la samideanoj, kiuj forpasis dum la epoko de ĉagreno kaj teroro 1939—1945! La manko de kompleta informado dum la milito kaŭzis, ke pri forpaso de multaj samideanoj oni nenion scias. Kaj se ni parolas pri „forpaso" ni diru ankaŭ ke ne malmultaj samideanoj fariĝis viktimoj de tiu ĉi senkompata reĝimo sub kies batoj tremis la mondo. Nomoj de lokoj konitaj nur al enlandanoj fariĝis signifoj: Auschwitz, Belsen-Bergen, Dachau, Theresienstadt k. t. p. En ĉi-tiuj nomoj fiksiĝas la memoro pri la plej granda devojiĝo de l'homa spirito.

Inter la miloj da viktimoj de ĉi-tiuj „detru-tendaroj" (Vernichtungslager!) troviĝas ankaŭ esperantistoj. Krome ni menciu la samideanojn pereintajn pro malsato, pro bombardado, la sinmortigoj pro malespero.

Venontjare ni kuniĝas denove en internacia kongreso en Berno. Signifa! Estis 1913 en Berno, kiam sub ombro de proksimiĝonta katastrofo, neforgesebla *Rousseau* formulis siajn pensojn pri paco en la ideriĉa parolado „UEA kaj ŝovinismo". Kaj estis germana kongresano, fervora esperantisto kiu laŭte ekkriis: *„Ĉu la milito ne estas necesa!"* La respondon donis la milito 1914—18. Kaj ree en Berno 1939, en mondo jam tremanta sub la plej kolosa militmaŝino ni kunvenis, senpove vidante alproksimiĝi la duan katastrofon.

En 1947 dum la 32-a kongreso ni havu solenon de memoro por la viktimoj 1939—1945 soleno dum kiu ne plu aŭdiĝos diraĵo kiel aludita antaŭe.

Nia movado estas porpaca kvankam ni ne povas partopreni en diskutado pri la plej bona maniero atingi veran pacon inter homoj, gentoj kaj popoloj. La viktimoj de l' Nazi-teroro fariĝis tiaj pro ilia pacama konduto kaj tial nia kongreso en Berno efektivigu la pacon inter niaj organizaĵoj honorante niajn mortintojn!

*Hans Jakob.*

---

**La sekvanta listo enhavas la mortintojn kaj mortigitojn 1939—1945. Ĝi ne estas kompleta. Dua listo sekvos post kelka tempo. Utilajn informojn oni sendu al la redakcio.**

# Niaj mortintoj 1939-1945

**Adams** F-ino Susanna Lister, 92 jaraĝa, fratino de pioniro A. J. Adams, en Hastings, 13 Julio 1940.

**Allemand** F-ino Raymonde, instruistino en Cours (Rhône, Francujo)

**Allen** Arthur, fidela samideano, Leek, Staffs, Britujo.

**Alonso** Sanz Vicente, Madrid, 28. V. 43, Dumviva membro kaj estinta Vicdelegito de UEA.

**Ardüser** Martin, 26 jaraĝa, akcidente en montaro, 28. V. 43. Vicprezidanto de la Svisa Esperanto Societo, Bern.

**Arnold**, H., ano de BEA kaj estinta ano de UEA no 40719 16 Februaro 1940 en Oxford.

**Aronowicz** F-ino Bronka, 6. IV. 1941 en Varsovio, anino de UEA dum kelkaj jaroj.

**Ashley** Archibald, pastro 11. IV. 43. Fondinto de la Eklezia Esperantista Ligo, Redaktinto de la Eklezia Revuo.

**Austerlitz** Tivadar, advokato, en Prešov, Slovakio, 15. IV. 40. Malnova Esperantisto kaj fidela membro de UEA seninterrompe de 1913 kaj Del. en sia loko.

**Azevedo-Magalhaes de**, F-ino Estevina, 35 jaraĝa, 14 Junio 1940, en Niteori, Brazilo.

**Bailey** Thomas Graham, 70 jaraĝa, 5. IV. 42 LK-ano, Hon. prezidanto de la Londona klubo. Estinta ano de UEA.

**Bär** Hugo, Germana esperantisto vivinta en Bulgario, 26. IV. 1940. Ano de UEA ĝis 1931.

**Baret** D-ro. Honora prezidanto de la grupo en Toulon, Francujo. Marto 1940.

**Basset** Paul, en Saulce sur Rhône, Francujo, Drôme, ano de UEA (Laŭ reveno de la Informa Bulteno 1 kun indiko poŝta „Mortinta”.

**Bastide** Georges, Junio 1940, en Rabat, Maroko.

**Bat'ěk**, Profesoro D-ro. Aleksandro, samideano en Praha, aŭtoro de internacia skribsistemo „Neoglifoj”, † 7. IV. 1944.

**Baudet** André, 64 jaraĝa, en Paris, 1940. Grandindustriisto, iama prezidanto de la Komerca Ĉambro de Paris, Vicprez. de la Franca Societo por Propagando de Esperanto, honora membro de UEA.

**Baxter** F-ino A. E. 74 jaraĝa en Liverpool.

**Baxter** J. G. 78 jaraĝa, 22. V. 43, en Liverpool. Malnova laborinto, estinta ano de UEA.

**Beattie** M. H., en Eastbourne, Britujo, malnova samideano, ĝis 1936 ano de UEA, fondinto de la unua grupo en Kalkuto (Hindujo)

**Benda**, Jaroslav, el České Budejovice ekzekutita en Tabor, Č.S.R. (Dato ne konata).

**Benson** D-ro Wm. S., kuracisto, 1945, Irvington N. J. Usono. Verkinto de la Universala E-Metodo. Estinta D de UEA.

**Biardoux** Aug., instruisto, membro de la Universitata Grupo Esperantista en Lyon, leŭtenanto en la 28-a R.T.T. ĉe la fronto. Davenescourt, Somme.

**Bleier** Vilmos, 1940 en Parizo. Tro konata estis lia agado kiel iniciatinto de l'eldono de bonstilaj verkoj, ke oni devus ankoraŭ speciale mencii tion. La lasta verko kiu eliris sub firmo de Literatura Mondo, estis la Svisa Antologio, kiu daŭrigis la serion de la Hungara kaj Ĉeĥoslovaka kaj kiu estis la 79-a libro eldonita de Bleier dum daŭro de ok jaroj.

**Bloch** Robert, kaj edzino, tre agema konata samideano en Praha, estinta ano de UEA, tre aktiva en la katolika movado pereis en Oswiecim-Auschwitz, 26. VI. 46.

**Blondel** S-ino Amélie, Genève, iama anino de LA STELO, fratino de F-ino Lapp, kaj patrino de F-ino Marguerite Blondel, fervoraj esperantistinoj, 11 Julio 1941.

**Bobbiesi** Hektor, fervora ano de l'Argentina E-Asocio Buenos-Aires, 3. X. 1941.

**Bobĉey** Stefan S., profesoro, juristo kaj slavisto, eksministro bulgara por publika instruado, amiko al Esperanto, Septembro 1940 en Sofia.

**Bellez** Hieronides Taciano, ano de la Brazila Klubo Esperanto kaj de internaciaj organizajoj.

**Belmont** Leo, 19. Okt. 1941, 76 jaraĝa, en Varsovio. Verkisto, ĵurnalisto kaj poeto. Li apartenis al tiuj junuloj de la unua esperantista generacio, brilanta per steloj de unua grado. Konata verkisto pollingva, multe subtenis la naskiĝintan movadon per sia plumo. Membro de la Lingva Komitato kaj de l'Akademio. Dum la bombardado de Varsovio lia loĝejo estis komplete detruita, li mem malsana, estis transportita en kelo kaj li finis sian vivon en mizero, spirite vigla kaj animforta.

**Beveridge**, John, 29. VII. 43. Unua prezidanto de Skota Esperantista Federacio. Kuntradukinto de la Nova Testamento.

**Bialer** F-ino Ina, en Varsovio, estraranino de la iama Akademia Esperantista Rondo, mortis sekve de gravaj vundoj dum la bombardado de l'urbo 1939.

**Blom** F-ino A, anino de la grupo en Alkmaar (Nederlando) Jan. 1941.

**Bonder** Jan, 51 jaraĝa, polica inspektoro, kursgvidinto por policanoj Hago, Decembro 1940.

**Borel** Guy, filo de nia fidela kunbatalanto Emile Borel en Lyon, Delegito en Fontainebleau. Arestita de la GESTAPO 18. X. 43, martirigita pro partopreno en la rezistado mortinta la 2-an de Julio 1944 dum transporto de Compiègne al Dachau.

**Boström** Lars, 68 jaraĝa, malnova ano de SAT kaj de la Sveda Laborista E-Asocio, fidela defendinto de nia afero inter laboristoj. 25. VII. 1941.

**Bourguignon** Honoré, Delegito de UEA en Callian (Francujo, Var), redaktinto de infana gazeto esperantista, en koncentracia kampo de Dachau, decembro 1944.

**Boutwood**, S-ino Elizabeth M. vidvino de samideano J. J. Boutwood, 28. III. 1941 en Letchworth, Brit.

**Briggs** T. C. G. 21 jaraĝa, 26. III. 42, en Nottingham BEA ano de sia naŭa vivjaro.

**Buchanan** George Douglas, Glasgow, 67 jaraĝa. Malavara subtenanto de Esperanto, esperantisto N-ro 8820 laŭ la fama adresaro de D-ro Zamenhof, G. D. B. partoprenis aktive en internacia kaj nacia laboro, okupis honorpostenojn en Brita Esperanto Asocio kies prezidanto li estis 1936—1939. En UEA li estis Del. en Glasgow de 1910 ĝis 1935 kaj DM no. 100.

**Bujwid** Odo, Profesoro, 85 jaraĝa en Krakovo, 1943. Respektinda aktivulo ĝis plej alta aĝo por nia afero. Fama scienculo, bakteriologo studinta, ĉe fama Pasteur. Honora ano de UEA. Nur pro lia alta aĝo li ne suferis sorton esti sendita al koncentrejo.

**Bulthuis,** Hindrik Jan, 1865—1945, en Noordbroek (Groningen). Pioniro de la movado en Nederlando, verkisto varia, de lernolibro ĝis originalaj romanoj, komedioj k. a.

**Bund** Salomon, D-ro advokato, en Lwow, Ukraino, dum aviadatako 84 jaraĝa, 9. IX. 1939.

**Burly** J. el Goole, Anglujo. 30. IV. 43 pro milit-agado.

**Buxton** Charles Roden, Britujo, 16. XII. 42. Estinta prezidanto de la Kvakera Esperantista Societo.

**Caburet** Eduard, 70 jaraĝa, Genève, 24. Novembro 1940 oficisto dum la unua tempo ĉe la C. O. de UEA. Sindona samideano kiu izole instruis la lingvon kaj formis novajn esperantistojn.

**Cerésole** Pierre, 67 jaraĝa, 23. X. 45, amiko sincera de nia movado kaj uzanta la lingvon kiun li parolis, por la Civila Help-Servo de li kreita.

**Chadwick** Jonathan, Rochdale, 1945, kunfondinto de la loka grupo.

**Clark** Henry, en Sidcup, Britujo, 20. I. 1942.

**Clayton** A. M. S-ino. Londono, 5. I. 1944.

**Clayton** William Ellis, 15. XI. 42 en Londono. Estinta ano de UEA, patrono de IEL.

**Coates** M. F. pastro, 86 jaraĝa en Hove, Anglujo, 11. I. 42.

**Cook** Ethel, F-ino 9. IV. 42 anino de la grupo en Ilford. Britujo,

**Cosandey** Ernest, eksfervojisto svisa, membro de la grupo Zamenhof en Lausanne. 16. VII. 41.

**Curuta** Joŝikacu, 4. Majo 1940, Seikei, Japan. Fervora ano de la Seikei E-Grupo.

**Dam** F-ino J. van., Rotterdam, okaze de la bombardado, 14 an de Majo 1940.

**Deshays** René, 71 jaraĝa, 29 Aŭgusto 1940 en Carpentras, Vaucluse. Multflanka verkinto, poeto. Malnova ano de UEA kaj estinta Delegito li alte ŝatis la internacian laboron de l'Asocio.

**Dietterle** Johannes, Profesoro, Ano de la LK. Distinga figuro en la movado, 77 jaraĝa dum Januaro 1943.

**Dinslage** J. F., 88 jaraĝa, en Londono, Malnova samideano, DM. de UEA. Donacinto de la domo en Heronsgate al IEL.

**Dlouha** F-ino Sidonie, prezidintino de la Rondeto de Esperantistinoj iama D de UEA: † 9. VIII. 1940, Praha.

**Dobson** J. W., 82 jaraĝa, 12. III. 42. Estinta ano kaj Del. de UEA en Chester, Anglujo.

van **Doorne** C., 1944, Rotterdam.

**Doroszlai** Mihaly, D-ro, grek-orienta parokestro en Subkarpata regiono de Hungarlando, 44 jaraĝa, 18. I. 44.

**Dovey** F-ino Emily, en Brighton, 3 Septembro 1940. Ĉeestis la unuan kongreson. Anino de UEA n-ro 9655.

**Duckworth** J.W. en Halifax, Britujo, 64 jaraĝa 21. VIII. 42. Dum multaj jaroj prezidanto de la loka grupo.

**Dufrenne** Jean B. B., 1884—1941, Amsterdam. Aktiva en la organizo de esp. poŝtoficistoj (ILEPTO) ano de UEA.

**Dupuis** Sinjorino Denise, edzino de la prelegisto esp. Roland Dupuis, Rouen, 6. Nov. 1945.

**Ede** Edward H., en Cardiff, 14-an de Junio 1940, 77 jaraĝa. Kunlaboris al nia gazeto per poeziaĵoj. Ano de UEA n-ro 31565 ĝis 1936.

**Edmanson** William L. 8a jaraĝa, Wellington, Nov-Zelando. Estinta prezidanto de la Novzelanda E-Asocio. 5. IV. 42.

**Edwards** Jack. La Kimra bardo el Aberystwyth, pioniro de la movado en Kimrujo, dum longaj jaroj Del. de UEA. Li atingis 89 jarojn, fidela al nia ideo ĝis la morto.

**Elmer** J. G. 27. III. 42, Cardiff, 20 jaraĝa. Ano de la loka grupo kaj de BEA.

**Emmott** Smith, Sowerby Bridge, Britujo, 31. I. 43.

**Evans** Charles Irwin, 71 jaraĝa, en Glastonbury ano de BEA de UEA ĝis 1936, vicprezidinto de la Esp. Kvakera Societo.

**Everdahl** Borg, Kiruna, Svedlando, en militservo 1944.

**Failletaz** Eugène, la bone konata fondinto de l' „Comptoir Suisse d'échantillons" en Lausanne, 22. 6. 44. Esperantisto svisa de l' unua tempo, unua prezidanto de la Svisa E - Societo. Retiriĝinte de la movado, li tamen sin servis de la lingvo por praktikaj bezonoj de l'Specimena foiro.

**Fjelke** S-ro G. eks-rektoro de popola altlernejo en Tierp, Svedl.

**Findlay** J. J., Profesoro, Honora profesoro de edukado ĉe Manchester Universitato, Junio 1940. Estinta ano de UEA.

**Fitton** James H. Februaro 1943, 65 jaraĝa. Okupis oficojn en Yorkshire Federacio, eldonis la libron pri Joseph Rhodes, pioniro de nia movado.

**Ford** A., Birmingham, DM de BEA, 2 Marto 1941.

**Fox** Walter H. D-ro. ano de UEA 16036, en Hartford, Michigan USA, Jan. 1941.

**Friberg** Sven, Prezidanto de la Verda Rondo en Boras, Sved. 21 jaraĝa, Majo 1940, Estinta ano de UEA.

**Fridrich** Rudolf, profesoro, estinta D de UEA en Brno, † 20. XI. 1944, Pardubice, C. S. R.

**Fukuta** Kunitaro, Osaka, Japanujo, 3. III. 1940. Esperantisto el la unua epoko de nia movado en Japanujo. Redaktis kaj eldonis la gazeton „Verda Utopio" kiu regule informis pri japana vivo kaj arto.

**Fulda** Robert, D-ro. Dumviva membro de UEA, de rus-germana deveno, vivinta longtempe en Berlino, kie li aktive partoprenis la movadon. Rifuĝis en Svislandon, loĝis en Lausanne, kie li mortis, Februaro 1944.

**Gabert** Eugène, Honora Membro de UEA, ano de ĝia fondo, dum longaj jaroj Delegito en Saint-Etienne 72 jaraĝa 1942 en Saint-Priest en Jarez.

**Gabriels** John, vicdelegito de UEA en Rotterdam, deportita je la 2 de Marto 1944 Germanujon kaj malaperinta. (Laŭ komuniko de Sro Uhlenbreek, Haarlem).

**Gili-Norta,** Joan, senlaca kataluna pioniro, 6. I. 42.



Aktive partoprenis nian movadon, fondis kaj prezidis la malnovan grupon „Barcelona Stelo". Ano de UEA kaj unu el la ĉefaj bastionoj de la neforgesebla enlanda Esperantista Federacio KEF kiu tiel konata fariĝis inter la Esperantistaro pro la „Floraj Ludoj". Lia aktiveco estis por nia afero, tiom vasta, ampleksa kaj granda ke ni devas rezigni citi lian multflankan agadon por E.

fer. Dreves Uitterdijk estis ano de la Lingva komitato kaj sincera amiko de UEA kies Honora Membro li estis. Dum Januaro 1940 sendinte donacon por helpi al Familio Zamenhof, li aldonis sumon kun la rimarko „Por UEA, ke ĝi povu labori kaj helpi".

**Vajsar,** Miroslav, 31 jaraĝa, el Ceska Lipa, membro de l' E-Klubo en Hradec-Kvalové, mortigita en Terezin-Theresienstadt, C.S.R., 2. V. 45.

**Vaona** Attilio, advokato en Verona, 60 jaraĝa, iam tre aktiva propagandisto, prezidinto de la Itala-Federacio.

**Vavrovsky** Jozef, 67 jaraĝa, ĝendarma ĉefserĝento, 20. III. 1946, pro apopleksio en Praha. Aktiva samideano precipe en . olica sfero, gvidis multajn kursojn. Dum pluraj jaroj ano de UEA. La funebran ceremonion ĉeestis esperantistoj kaj Radio-Praha informis pri la forpaso de tiu-ĉi simpatia kunlaboranto.

**Vermaas** Pieter Jacobus, Rotterdam, 18 decembro 1942, 64 jaraĝa, DM kaj HM de UEA. De 1908 seninterrompe ano kaj delegito de UEA fidela kaj agema kunlaboranto, multe oferinta por la movado. Dum malfacilaj momentoj de la Asocio, Vermaas restis firma kaj lia konstanteco savis ofte situacion komplikigitan. Liajn meritojn por la Asocio, la Komitato de UEA rekonis, nomante lin en 1933 HONORA MEMBRO DE UEA.



**Vis** A., predikisto protestanta, Oktobro 1940, Heelsum, Nederlando.

**Waldstein** Rudolf, el Praha, estinta ano de UEA pereis kun edzino kaj filino en Terezin (Jaro ne indikita)

**Walther** Kurt, Dresden, Majoro en la germana armeo, sur orienta fronto, la lasta prezidanto de la Germana Esp.-Asocio, vane klopodis savi nian aferon en 1936 de la ĝenerala ekstermo de internaciaj aferoj en Germanujo.

**Waltisbühl** Anton, 81 jaraĝa, konata negocisto pri oficejaĵoj en Zürich, 15. Novembro 1940 en Morcote, Tiĉino. Volapükisto, Esperantisto, idisto, S-ro A. W. ludis iam rolon en la movado, precipe dum la tempo de l'skismo.

**Weissbach** el Praha (Deportita, malaperis)

**Weisskopf** Moric, estinta ano de UEA, esperantisto de 1900, deportita al Terezin (Theresienstadt) pro elĉerpiĝo sekve de perforta laboro, 60 jaraĝa (jaro de l'forpaso ne indikita).

**Wells** H. G., Del. en Southall, Middlesex, 21. III. 1941.

**White** Cedric F., 2. X. 1941. Multe klopodinta por E. en Britujo kaj Aŭstralio.

**Williams** L. E., 71 jaraĝa. Kunfondinto de la E-Societo en Bedford, Anglujo, 9. III. 43.

**Wolf** Jules, 2. VIII. 1944. Chaux-de-Fonds, Svislando. Fondinto prezidanto kaj Hon. Prezidanto de la loka grupo, fidela amiko al UEA kaj ĝia multjara Del.

**Worthington** E. G., en Southborne, 22 Marto 1940. Fratulo de BEA kaj malnova ano de UEA n-ro 18698 gis 1936, iama Delegito en Bournemouth.

**Zamenhof** S-ino Helene, onklino de Sofia kaj Lydia Z. Varsovio. (dato ne komunikita)

**Zamenhof** S-ino Leokadja, vidvino de D-ro Leon Z. frato de la kreinto de Esperanto, mortis post mallonga kruela malsano, 22. VIII. 41 en Varsovio. Estinta ano de UEA.

**Zeidlitz** Otto, Parokestro, 82 jaraĝa, en Pajala, Laplando, Sved Kunfondinto de la klubo Upsala 1891, Augusto 1943.

# Universala Esperanto-Asocio

Palais Wilson - Genève (Svislando)

## Oficiala Informilo 1946 (5)

**Adreso de UEA.** Ĝis plue validas la sama adreso, Palais Wilson, Genève, telefono 2 30 34. Personoj dezirantaj renkonti la Administranton bonvolu sin anonci antaŭe por fiksi tempon de rendevuo.

**Delegitoj de UEA.** — Alflugas novaj Delegitoj, respektive novaj lokoj kun D tiel ke ne estas eble ilin publikigi laŭtempe.

Kvara listo.

**Cruceni-Arad** (Ruman., Banat)
D.: Othon Adrien de Choibert, profesoro, Piata Eroilor 9.

(17 b) **Freiburg im Breisgau** (German, Baden) — Franca Zono.
D. Julius Mathes, muntisto, Sternwaldstrasse 5.

**Funchal** (Portugal, Madeira)
D.: H. T. Gomes de Freitas, rua 31 de Janeiro 141.

**Goya** (Argentinio, Corrientes).
D.: Riv. Sacerdoto Bruno Ostropolski, vikario.

**Hong-Kong** (Ĉinlando)
D.. Sinjoro Kilu (Mr. Luk Ki Ngok), c/o Mr. Mak Tak ting, Lammert Bros. Auctioneers, Pedder Bldg.

**Kairo** (Egipto).
D.. M. Sherif Hafez, ĉefoficisto, departemento de arabaj monumentoj, B. P. 56, Le Caire.

**Luzern** (Svislando) —
D.: Richard Huber, poŝtoficisto, Rebhalde 1.

**Marburg a. d. Lahn** (German., Brita Zono)
D.: Heinrich Weiershäuser, frizisto, Steinweg 28.

**Mölln** (Germanujo, Lauenburg, Brita Zono)
D.: Ernst Frank, Landhaus Lotte.

**Montevideo** (Urugvajo)
D.: Romulo Zeballos Morales, dentkuracisto, Lima 1882.

(17 b) **Säckingen** (Germ., Baden, Franca zono)
D.: Kurt Ullrich, Hauensteinstrasse 5.

**Salonta** (Rumanio, Bihor)
D.: Ladislao Pordas, urba ĉefnotario, str. Bicskai 35.

**Schönebeck** (German., Prov. Sachsen)
D.: Walther Gieseler-Fischer, Böttcherstrasse 33.

**Tirnovo** (Bulgario)
D. Georgi Donĉev, str. Gurko 1.

**Vaasa** (Finnlando)
D.: Erkki Mansikka, Raastuvankatu 55.

(22 a) **Velbert** (German., Nordrheinprovinz) Brita Zono
D.: Hermann Korell, instruisto, Grünheide 15.

**Voitsberg** (Aŭstrio, Steiermark)
D.: Johano Javernik, kompostisto, Postfach 2.

**Kunfandiĝo de UEA kaj IEL.** — La venonta numero de ESPERANTO enhavos kompletan informaron pri la kunfandiĝo de la du organizaĵoj, kaj la funkciado de la unueca organizaĵo depost unua de Januaro 1947. Ni atentigas tamen, ke la Centra Oficejo de UEA ne fermos sian pordon, plie ke ESPERANTO daŭrigos aperi, kiel sola organo de la organizaĵo, sed presota en Britujo.

# Esperantista Interhelpo

Ni ricevis plurajn demandojn, ĉu ni povus sendigi pakaĵojn pere de CARITAS, Luzern, al personoj en Aŭstrio kaj Germanujo kontraŭ depono de la kosto en landoj, de kie rekta monsendo al ni estas aŭ ne ebla aŭ tre komplika.

Pro la risko de kurzperdo kaj la neebleco, ke ni kreditigu por longa tempo, ni devas nei. Sed ekzistas alia vojo, kiun ni konsentas al niaj samideanoj. Oni povas escepte pagi al ni per respondkuponoj, kies kontraŭvaloro estas 0.30 frk. en Svislando.

**Kunstovny** O., Profesoro D-ro, aŭtoro de projekto de L. I. „Serve" † 11. VII. 1945, Praha.

van de **Laarschot,** E. J M., D-ro, DM de UEA, en Blaricum, 2. XII. 41, admiranto de l'majstro, fervora batalanto por pura lingvo.

**Lajarte** René, de, Paris, Ano de la Esperantista L. K. 1944 (Sen preciza dato, informo el Nederlando.)

**Lajos** Ludoviko Varga, hungara samideano, el Nagyszalonta, sur batalkampo.

**Langenegger** Robert, en St. Gallen, 16. VI. 1941, 70 jara, verkinto de poemoj, silentema modesta homo, ano de la loka grupo.

**Larroche** F-ino Marie, 86 jaraĝa, 1942, en Rodez-Aveyron, rifuĝinte el Parizo. Tre aktiva en la katolika E-movado, sindona laborinto por la bono.

**Lathus** R., Prezidanto de la loka grupo en Saint-Benoit, Francujo, Januaro 1940.

**Laukkanen** Olli, Helsinki, 53 jaraĝa, 1941. Ĉefdel. kaj sekretario teritoria de UEA. Li firme staris ĉe UEA kaj per brilaj artikolov provis montri la esencon de la organiza problemo. En la E-instituto en Kluuvikatu 5 li fidele laboris kiel oficisto, servinta ĉiun laupove, ĉiam helpopreta kaj servema.

**Lavender** F-ino Agnes G. en Manchester, 8. I. 1942.

**Lederer** Sinjoro, el Praha, estinta ano de UEA, pereis kun edzino, (eks-f-ino N a ss ankaŭ esp-isto) en Terezin. (jaro de orpaso ne indikita)

**Lee** Ernesto, 72 jaraĝa, 17. XI. 1940, estinta Del. de UEA en Crewe, Anglujo, laste Del. de IEL.

**Lundgren** John, veterano de la movado sveda, 70 jaraĝa, en Hedemora, dum multaj jaroj ano kaj Del. de UEA. Redaktis kaj eldonis la gazeton „Sveda Esperantisto", de 1913—18; prezidanto de la Sveda E-Federacio, redaktinta tiam ankaŭ la gazeto LA ESPERO. Bonege majstrante la lingvon, John Lundgreen apartenis de 1913 al la LK.

**Mackay** William Robert, Ilford, Britujo, 16. VIII. 1941. Prezidanto de la loka grupo, multvojaĝinta samideano. Estinta ano de UEA.

**Magnus-Focké** S-ino, Orléans, Junio 1940. — Pro mem-mortigo — Sindona esperantistino, fidela anino de nia idealo, multe penadis pro ĝi, malavare subtenis kiel dumviva membro de UEA kaj de IEL.

**Majlath de Szekhély,** Grafo Gustavo Karlo, episkopo katolika de Transsilvanio, dum Marto 1940 en Budapest. La mortinto estis sincera amiko de nia movado, kion li montris per efika subteno de la agado de Andreo Cseh, en la lando mem kaj en eksterlando. Grafo Majlath, ano de fama hungara familio, komprenis la altan valoron de internacia lingvo, el propra sperto kaj mem lernis nian lingvon. Li malavare subtenis E-organizaĵojn kaj estis ano de UEA dum multaj jaroj.

**Maly** Stanislav, faka instruisto, prez. de la grupo en Mnichovo Hradiště, C. S. R., (Dato ne konata).

**Marek** Karel, 47 jaraĝa, D-ro de medicino, fondinto kaj prezidinto de l'grupo en Mlada Boleslav. Tre aktiva inter kuracistoj. Arestita de la GESTAPO 1941, kondamnita al morto, forpasis en hospitalo-malliberejo Moabit-Berlin 1943 pro manko de flegado dum malsano.

**Martin** Rafaelo, 23 jaraĝa, hispana samideano, sekve de ekzerpiĝo, 5. V. 1942 en Bram (Aude) Francujo. La esperantistaj internigitoj ĉeestis la enterigon.

**Matthewson** H., 55 jaraĝa en Edinburgo, Skotlando, Marto 1941.

**Mâtjâs** Jozefo, en Debrecen, Hungarujo, 43 jaraĝa. Instruis nian lingvon dum somerkursoj en la Universitato de Debrecen, Specialiĝis observi tekstojn de lernolibroj pri Hungarlando, korektis erarojn kaj atentigis verkintojn kaj eldonintojn.

**Megahy** S-ino Sarah Marianne, 85 jaraĝa, edzino de bone konita samideano Basil P. Megahy, DM de UEA 104, 29 Aprilo 1940, Preston.

**Megahy** Basil Patras, 20. VI. 1941, 88 jara en Preston, Britujo. Aliĝis al BEA en 1908, al UEA en 1913 kiel Dumviva membro 104, konata kvakero, gastama viro.

**Miller** S-ino Eliz., 83 jaraĝa en Wisbech, fidela anino de UEA n-ro 30056. Amikino de F-ino Priscilla Peckover, fervora kvakerino kaj subtenantino de nia movado, interalie per la financigo de la tuta eldono de l'Biblio.

**Milĉev** Borislav D, 32 jaraĝa, vilaĝo Kneja, Bulgario, 1942.

**Millidge** Edward A., 75 jaraĝa, 22 Marto 1941 pioniro en la brita movado, verkinto de la Esperanto-English Dictionary, unu el la plej bonaj vortaroj nacilingvaj.

**Moelke** F-ino Martha, Berlin 1. X. 44 — Distinga samideanino, kunlaborantino de Profesoro Dietterle, sekretariino de IALA por Germanujo, konvinkita Zamenhof-anino, multe helpinta al persekutitoj dum la terorjaroj de al Tria Regno.

**Monk** D. A., Birkdale, Britujo, sekve de milita ago. (sen indiko de dato)

**Montezemolo,** Carlo di, Marchese, itala generalo, 82 jaraĝa, Castiglioncello, 2. VIII. 1943. Estinta prezidanto de la Itala E.-Federacio. Nobla viro, fervora defendanto de E dum malfacila epoko.

**Moravkova** S-ino Bozena, instruistino, plej malnova membro de l'Unua Virina grupo esperantista, Praha, † 11. VI. 1944.

**Moreau** Arie Léopold, Arnhem, Nederlando, 51 jaraĝa. Multe laborinta en la loka movado, dum kelka tempo mastro de la Esperanto Domo en Arnhem. Fidela ano de UEA, 26920, depost 1924.

**Mortimer** Harry, 27 Majo en Manchester. Eks-ano de UEA kaj fervora subtenanto de BEA.

**Mrazkova,** F-ino Tonĉa, el Olomouc C. S. R. — Idealisma persono, ardanta por bono kaj vero. Mortturmentita. 25-IX-42.

**Müller** Fritz, apotekisto, Julio 1940. Fidela ano no. 8391 de la komenco de UEA kaj Delegito en Cortaillod, Svislando.

**Münz** Adolf, 19. III. 43 en Londono. Estinta ĉefdel. de UEA en Berlin, rifuĝis 1935 en Anglujon.

**Najdenov** Ivan Hr, majoro pensiita, 25 Oktobro 1940 en Sofia.

**Nisimura** Masao, Osaka, 23. V. 1940. Estinta ano de UEA.

**Nordlund** Nils, 71 jaraĝa, en Kristianstad, 11. II. 43. Verkinto de lernolibro sveda.

**Norman** Eleanor, F-ino, estinta sekretariino de la okcidenta Mezlanda Federacio, Delegitino de IEL en Birmingham, 18. V. 1941.

**Notz** Edouard, Genève, 8. V. 1944. Komandanto de la Aerprotekta Bataliono de Genève kaj ĉefo de la Aerprotekta servo, nevo de nia komitatano Hans Jakob, 40 jaraĝa. Li multe helpis al la organizo de la 17-a kongreso kaj desegnis la belan kongreskarton.

**Novak** S-ro **František,** pioniro de nia movado en ĉeĥa lando, † 29. IX. 1940, Praha.

**Nowell** Hugh Noel, DM de UEA kaj Del. en Sandwich, Kent. 18. III. 1940.

**Nuñamović,** MA de UEA en Bucuresti, bofrato de Henriko Harabagiu, sekve de bombardado, 4. IV. 44.

**Older** Ronald, 19 jaraĝa, sekve de milit-agado en Petworth, Sussex

**Oumansky,** N., S-ino, Genève 1945 — Esperantistino de 1910, kunlaborinto al ESPERANTO, fidela membro de l' loka grupo „La Stelo".

**Page** Williame Maine, Edingburgh, Skotlando, 1. Febr. 1940, 71 jaraĝa. Esperantisto de 1905. Neforgesinda estas lia majstra redaktado de la gazeto Esperanto Monthly, kaj aro da aliaj verkoj, tradukoj speciale de himnoj kaj kantoj, pruvis lian superan posedon de la lingvo. En la movado li okupis diversajn postenojn, interalie dum pluraj jaroj la vicprezidantecon de UEA, kies honora membro li estis. Al li oni dankas projekton de organizo, ellaboritan plej zorge, atentante ĉiujn erojn de la movado, entute perfekta projekto.

**Patai** Samu, D-ro. registara ĉefkonsilanto, nestoro de Esperanto en Budapest, 7. I. 1944, 85 jaraĝa. (laŭ Hungara Heroldo, Marto 1944.

**van Pelt** P. G., samideano el Schiedam, Nederlando, plenuminta soldatan devon sur batalkampo, 10-an de Majo 1940.

**Person** Dagmar, instruistino, Boras, Svedlando, 17. V. 1944.

**Persson** F-ino Maja, 28 jaraĝa. 17. I. 1941 en Lund, Svedl.

**Petkov,** Ivanov, Angel. 32 jaraĝa, bulgara samideano, redaktinto de periodaĵo Lingvo Internacia (nacilingva) kaj de E-paĝo en la taga gazeto Zarja.

**Peyraud** Benoit, vicprezidanto de la Esperantista Grupo en Saint-Etienne, iama vic-delegito de UEA, partopreninto de la Unua kongreso en Bulonjo, pro aŭtomobil-akcidento la 15-an de Julio 1940, 65 jaraĝa.

**Phipps** W. G., 1945 en Cheltenham. Estinta ano de UEA.

**Pickard** J. W. VD. de IEL en Manchester, 10. XI. 42.

**Pickles** Leonhard, 9. III. 43, Keighley, Anglujo.

**Pierrat** S-ino Marguerite, Genève, 1940 28 jaraĝa, anino de la loka grupo esperantista.

**Plotton** Pierre, iama VD de UEA, eks-kasisto de la Esp. grupo en Saint-Etienne, 27 jaraĝa, Januaro 1941.

**Pointer** Mary S-ino. 91 jaraĝa, DM de UEA, St. Neots, Anglujo, malavare subtenis la movadon.

**Popper** Hugo, DM de UEA kaj D. en Ĉeska-Kamnice, depost 1938 en Praha, mortis pro disenterio en Oswiecim-Auschwitz 1944.

**Pressburg** el Praha. Ano de UEA. (Malaperis, deportita)

**Price-Heywood,** Brian, Bonkonata esp. kvakero pereis dum subakvigo de ŝipo, reveturinta al Britujo de insulo Pemba en Hinda Oceano. Dum kelkaj jaroj ano de UEA kaj licenciato de Brita Esperanto-Asocio.

**Pringle** James. 27. VII. 1941. 84 jaraĝa en Edinburgo. Li aliĝis al BEA en 1908, al UEA li partoprenis dum kelkaj jaroj.

**Pruski** Czeslaw, dum multaj jaroj Del. de UEA en Lublin, Polujo. Estis mortpafita kiel garantiulo, 1939. 42 jaraĝa.

**Radusin** Ivan, 26 jaraĝa, ano de la Laborista E-movado, en Zagreb, 26. V. 1940.

**Rae** William, Parkstone, Anglujo, estinta ano de UEA. 3. XII. 43.

**Rakos** Istvan, reĝa, konsilanto, hungara samideano.

**Rambousek** Jan, Generalo, DM de UEA en České Budejovice, Morti: 1-XII-1945 en Zborov, ĈSR.



ĈSR., malnova, maljuna sed ĉiam vigla oferema esperantisto, fidela amiko de UEA el la tempo kiam li dejoris kiel aŭstria oficiro (Major der Festungsartillerie) en Przemysl, Galicio. Malaperis kun li tiu ĉi karakteriza figuro de profesia soldato, kiu ne nur studinte la militarton laŭ Clausewitz, sed interesiĝis pri kulturaj demandoj, aktive partopreninta, interalie en nia movado. Sincera patrioto ĉeĥa, la respubliko lin nomis generalo en la nacia armeo. Depost 1924 li tre aktive laboris por Esperanto kaj pruvis, ke oni povas tre bone esti bona filo de sia lando kaj civitano del'mondo.

**Raŝka** Josef, el Pribor, Ĉ. S. R. 37 jaraĝa. Partoprenis en la aktiva rezistado, arestita kaj post longa turmentado ekzekutita en Breslau 16. IV. 1943.

**Ratten** A., D-ro., Melbourne, Aŭstralio, 83 jaraĝa. 19. IV. 44.

**Reilly** Peter, librej-posedanto, longjara ano de UEA, Philadelphia, Pa., 9. Julio 1945.

**Richez** Renaud, 56 jaraĝa, Genève, 29-III-1945.



De belga deveno, R. R. apartenis al la una ekipo de UEA Delegitoj. Vokite 1915 de H. Hodler al Genève, por labori en la C. O. de UEA, R. R. akiris al si ĉie amikojn dank'al sia anima trankvileco, indulgo kaj lojaleco. En la internacia rondo amikeca kiun ni formis (armenoj, belgo, brito, ĉeĥoj, francoj, germanoj, latvo, nederlandano, poloj, rusoj, svisoj, usonanoj,) R. R. estis ĝenerale ŝatita, ĉar neniam li koleriĝis, eĉ ne en plej akra disputado. Kulturita homo li pasie amis la pentro-arton, kvankam ne praktikante ĝin.

En 1923 li fariĝis funkciulo en la sekretariejo de la Ligo de Nacioj, kie li apartenis al multŝatita kolegaro. Post la fermo de l'sekretariejo, R. R. laboris en la Ruĝa Kruco centro de reserĉado kaj tie sukcese helpis al familioj esperantistaj serĉintaj familianon malaperintan. En 1944 la Ligo de Nacioj revokis lin sed jam tiam evidentiĝis ke la terura malsano en la gorĝo ne plu lasas esperon. Post suferado eksterordinara, faciligila per la sindona flegado de l'edzino, R. R. mortis 29-III-1945, lasante edzinon kaj filon.

La ŝaton kiun li akiris esprimas la rimaĵo de S-ino M. Huber-Jaccard el Arbon.

Post longa laboro
foriras pioniro
De lia bonkoro
alvokas rediro... H. J.

**Rikand** Hindrek, eks-direktoro de la estona poŝto, 65 jaraĝa, en Talinn. Malnova simpatianto al Esperanto li eklernis la lingvon en 1928 sub la impreso de la majstra kursgvidado de Andreo Cseh. Kunlaboris en la societa agado ĝis laste.

**Robinson** G. S. Kolonel-leŭtenanto, 85 jaraĝa, Prezidanto de la grupo en Eastbourne, estinta ano de UEA, DM. de IEL, fidela laborinto por nia afero. 8. V. 43.

**Rohliček** Vaclav, de ĉefia deveno, multjara membro de UEA en Basel, decembro 1944.

**Rollet de l'Isle** Maurice, ĉefo de l'hidrografia servo, Paris, 24 Novembro 1943, 84 jaraĝa. Distinga figuro de la unua tempo de nia movado, klera kaj klarvida homo dediĉinta sin post pensiiĝo entute al Esperanto, Plurfoje prezidanto de la Franca Societo, de la Akademio, ano de l'estinta Centra Komitato, diligenta verkinto DM de UEA.

**Roth** Simon, blinda samideano el Stari-Beĉej, Jugoslavio kun sia patrino en koncentrejo Mauthausen (dato ne indikita)

**Rudhardt** Albert, Genève. Majo 1944. Lerneja profesoro, aliĝinta al Esperanto 1922 dum la tempo de la deviga instruado de nia lingvo en la sepa klaso.

**Ruus** Neeme, SAT-ano el Tallinn, Ministro por sociaj aferoj de la Sovjeta Respubliko Estona. Laŭ informo de gazeto Laborista Esperantisto, Stockholm, Ruus estis arestita de la germanoj 1941 kaj vidita lastfoje en malliberejo de Tallinn kaj poste ekzekutita. Okaze de la helpagado de UEA por familio Zamenhof ni vigle korespondis kun Ruus kaj li promesis sian helpon.

**Rybarik** Jaromer, el Domazlice C. S. R., (Dato ne konata).

**Ŝafranek** Josef, el Ĉeské Budejovice, mortis en Dachau (dato nekonata), post 18 monato enkarcerigo.

**Sapiro** Jakobo, Ĉefdelegito de UEA en Polujo, Bialystok, ekzekutita de l'germanoj 1942.

**Satchell** C. H. H. Eastborne, estinta ano de UEA, dum kelkaj jaroj ano de la Konsilantaro de BEA. 23. VIII. 43.

**Saussure** René, de, en Bern, 71 jaraĝo, Decembro 1943. Estinta LK-ano, pioniro kaj propagandinto de nia ideo en sciencaj rondoj, lingvisto, redaktoro de la Scienca Revuo, aŭtoro de la teorio pri „Bezono kaj sufiĉo en la vortformado de Esperanto" kaj de multaj prilingvaj studioj k. an. verkinto de pluraj libonigoj de E.

**Scharf** F-ino Emilia, Lwow, unua USSR (Ukraino) dum aviadatako 18. Sept. 1939, 33 jaraĝa. Splito de bombo trafis ŝin kaj la morto estis subita. Adiaŭan vorton ĉe entombigo diris samideanino Minuŝka Mantel.

**Schallheimova** F-ino, el Praha (Deportita, malaperinta)

**Schoon** J. W. F., Rotterdam, kune kun sia edzino fariĝis viktimoj de la bombardado, 14. V. 1940.

**Schüssler** Albert, profesoro en Kecskémet, Hungarlando. Estinta ano de UEA.

**Schweingruber** Ernesto, inĝeniero de Genève, edzo de Ilona Gewürtz, el Targu - Mures, fervora samideano, servema kaj helpema homo. Dum jaroj vivis en Orléans, konata al tieaj sam-anoj kiel „S-ro Grubero". Revenis Svislandon pro militservo kaj tie aktive partoprenis la grupan vivon. Mortis pro akcidento en la montaro dum militservo, 17-V-1945.

**Sidebottom,** F-ino E. A., Manchester, estinta anino de UEA patrono de IEL. 17. II. 43 (BE)

**Simeon** Stefan, 79 jaraĝa, Luzern Svisl. 26. I. 1942. Aliĝis al la movado 1910.

**Simon** Otto, profesoro el Vieno, Seattle, Cal. USA. 12. IV. 1941. Pioniro de nia afero en Aŭstrio, verkinto de lernolibro, de sennombraj artikoloj, ano de LK., de la ŝtata ekzamen-komisiono aŭstria ktp. Rifuĝis Usonon kun familio.

**Sigemacu,** Tacuiĉiro, 72 jaraĝa, en Kagoŝima, Japanujo. Profesoro en Imperia Kolegio Agronomia kaj Arbarscienca de Kagoŝima, ĉefloko provinca sur Kjuŝju-Insulo. Malnova esperantisto, prezidinto de pluraj societoj kaj pacienca kursgvidinto. Lia tuta familio lernis la lingvon kaj formis veran rondon familian esperantistan. Kiel specialisto agronomia li faris ŝatindajn servojn al sia lando, interalie li kreis valorajn specojn de rizo.

**Skrzypinski** Jan, inĝeniero, estinta ano de UEA, en Varsovio 1941.

**Slavik** Antonin, inĝeniero, direktoro de Radiostacio Brno, ĉefa aginto por la „Verda stracio". Arestita jam 1939, kondamnita al morto 1943, ekzekutita 27. X. 1943, Plötzensee, la malliberejs en Berlin. (Kortuŝa la priskribo de l' lastaj tagoj de tiu-ĉi eminenta fakulo en la disaŭdiga arto, en „Esperantista" ĉeĥoslov. revuo).

**Smith** J. E., 32 jaraĝa, pastro en Halifax. 25. XI. 1940.

**Soek** Dirk, de Hilversum, Nederlando, en batalo ĉirkaŭ Dordrecht, 10-an de Majo 1940.

**Spink** F-ino A., en Stillington, York.

**Stettler** Eduard, de Bern 1880—1940. La lasta el la TRIO de UEA Hodler, Stettler, Rousseau. La „juristo de UEA", kiu donis al ĝi la firman formon mankintan al aliaj esp. organizaĵoj. Sendependa li sin dediĉis al socialaj kaj bonfaraj verkoj lokaj internaciaj, ĉio kun malofta energio, pacienco kaj obstino. (V. nekrologon ESPERANTO 486).

**Stroelé** Georges, Neuchâtel, Svis. Ano de LK. 7. X. 43. Dum 20 jaroj talenta recenzisto ĉe la gazeto ESPERANTO. Unuaranga stilisto, pacienca leganto de ĉio kio aperis en kaj pri nia lingvo" „la plumo trempita en mielon" kiel diris Kalocsay.

**Ŝipek** Henrik, S-ro D-ro, kuracisto, iama D de UEA en Heliopolis, † 6. III. 41 en Luhaĉovice, C. S. R.

**Stuarth-Menteth** C. G. 74 jaraĝa, Oxford, 25. II. 43. Pioniro de nia movado.

**Székely** Zoltan, 67 jaraĝa, en Pestszentlörinc, Hungarlando, dum Julio 1940. Unu el la pioniroj de la movado en Hungarlando, tradukinto de multaj noveloj, kunlaborinto de LA VERDA STANDARDO.

**Takahaŝi** Kunitaro, 73 jaraĝa. 18. VI. 1941, Shizuoka. Konata homo kaj nomo ... pioniro el 1904, restinta fidela al juneca amo, tiel oni povas karakterizi forpasintan japanan samideanon Takahaŝi. Inter liaj verkaĵoj en Esperanto estas citinda la „Orienta Almanako" hodiaŭ ne plu havebla libro. Kunverkis al gazetoj kaj havis vastan korespondadon kun ĉiulandaj esperantistoj. Ano de UEA dum 15 jaroj.

**Thoday A.,** membro de IEL, 30. IV. 43 en Londono.

**Tihanyi** Jozefo, kolonelo, hungara samideano.

**Tondelier** F-ino Andrée, Lille, ne povante suferi la okupacion sin memmortigis 1940.

**Trancu - Iaŝi,** Prof. Grigore, eksministro de komerco rumana, eksprezidanto de Rumana Esperanto Societo. 10. I. 1940.

**Turksma** Marcel, 14. V. 1940 dum la bombardado de Rotterdam plenuminte militistan devon.

**Tribouillet** Edmundo Felix, Rio de Janeiro, Decembro 1941. Multjara kasisto de la Brazila Ligo Esperantista kaj komitatano de Brazila Klubo de Esperanto.

**Trinas** Laureano das, pioniro de la movado en Brazilo, Julio 1941. Kunfondinto de Brazila Klubo kaj de la Brazila Ligo. Eksmembro de UEA.

**Tullo** David Ritchie, 65 jaraĝa, 23. II. 42 en Edinburgo, Skotl. Del. kaj komitatano de UEA, konscia kaj fidela servinto de nia movado.

**Uitterdiik,** Dreves, Hilversum, Nederlando, 74 jaraĝa. 1940. Tipa figuro de la unua epoko de Esperanto al kiu li aliĝis en 1898 kaj verkis la unuan lernolibron holandan aperintan en 1901 Li fondis la gazeton „Holanda Pioniro" kiu aperis de 1902 ĝis 1905. Verkis vortarojn kaj ekzercarojn kaj ĉiel laboris senegoisme por la ideo, oferinte liberan tempon kaj monon. Pleje konata en vastaj rondoj li fariĝis per la libro „Longkrurulo", versoj kun desegnaĵoj laŭ la stilo de la ĝeneva verkisto Toepf-

**Gottgetreu** Paul, Hannover. (Patro Difidela) 85 jaraĝa. 7. II. 1940. 1939 li ankoraŭ skribis al ni, dankante por la regula ricevo de ESPERANTO kaj esprimante sian fidon al la boneco de nia afero spite ĉio, kio pasis. Ano de UEA de ĝia fondo, la komitato de UEA nomis lin Honora Membro, en 1933.

**Gianfranceschi** J., 1945, estinta D de UEA en Buffalo, N. J. Usono

**Gray** Ernest F., en Alton, Hants., 5 Februaro 1941.

**Grieve** Thomas, 7. I. 42, en Stirling, Britujo.

**Grootenharst** J. W. C., 73 jaraĝa, 17. VIII. 1940 en Zeist (Nederlando).

**Gunĉev** Gunĉo St. 36 jaraĝa, 2. VI. 1940. Redaktinto kaj eldoninto de Esperanto-Biblioteko „Svetovnik" en Pleven, kunlaborinto de „Bulgara Esperantisto".

**Habellok** Georg, Berlino, Marto 1940,, post kelktaga suferado, 60 jaraĝa. Malaperis per tiu ĉi samideano unu el la lastaj funkciuloj de la Germana E-Asocio. Fervoja inspektoro, li multe klopodis en fervoja medio, verkis fakan vortaron kaj estis plej aktiva laboranto en la tiama Fervojista E-Asocio kaj de 1930 ĝis 1935 la afergvidanto. Modesta kaj senpretenda homo, kies granda ĉagreno estis la ĉesigo de nia movado en Germanujo.

**Hammar** F-ino Marie, 92 jaraĝa, en Helsingborg, plej maljuna esperantistino en Svedlando.

**Harabaĝiu,** Henry, Bucureŝti, 4. IV. 1944, 38 jaraĝa, dum aeratako Ĉefdelegito de UEA, ĝenerala sekretario de la Rumana E — Societo.



Juna knabo ankoraŭ, li fariĝis adepto de esperantismo, kreskis en la spirito de nia ideo kaj dediĉis sian vivon, pensadon, ĉiutagan agadon al batalo por homara paco kaj interkompreniĝo per Esperanto.

Du dekjaroj estis li vigliganto de la rumana esperantistaro — komence de kunvenoj, kursorganizado, ĝis kongresaranĝo kaj dum hitlera persekutado, sia hejmo estis kaŝejo de rumanaj aŭ eksterlandaj rifuĝintoj esperantistoj. Kun neegalebla laborforto, alloga personeco, altinstruita, li estis amiko sindona, oferema, en kiu oni povis havi ĉiam konfidon kaj esperon.

Kun sia sperto, granda animo kaj lerteco li ne nur ĉiam helpis, konsilis siajn amikojn rumanajn, sed ankaŭ respondis al miloj da servopetoj kaj leteroj.

Li apartenas al la galerio de batalantoj progresemaj inter la fondintoj de Esperantujo.

**Harding** Leonardo. Jan. 1942, blinda samideano en Portsmouth. Esperantisto de 1930. Li verkis kaj belan kaj inspiran muzikon por „La vojo".

**Hartley** J. W., Burnley, Anglujo, 21. XII. 1943.

**Hartmann** Adolf, el Varsovio, ĝen. Sekretario de la Jubilea Kongreso 1937, mortis komence de la milito 1939 kiel pola soldato.

**Hawkins** Edgar A., 16., III. 1941, estinta ano de UEA.

**Haworth** Ernest, ano de la grupo en Burnley, Anglujo. 2. XII. 1939.

**Hayes** Charles Frederick, 9. I. 1942. Verkis kun D-ro O'Connor la konatan English-Esperanto Dictionary (1907) Malnova ano de UEA.

**Helma** Oldrich, el Brno, dum okupacio de Ĉeĥoslovakio forflugis Anglujon, pereinta en aerbatalo enterigita 7. VII. 1941 en Salisbury.

**Hesketh** John, 77 jaraĝa en Birmingham, Malnova fervora esperantisto, ano de UEA, n-ro 17210.

**Hetzel** Henry William, febr. 1941, 69 jaraĝa, profesoro en supera lernejo, Philadelphia. Malnova esperantisto, plurfoje okupinta gvidan postenon en la movado. DM kaj HM de UEA kaj dum multaj jaroj ties Del. por Philadelphia.

**Holm** Karl Israel, 75 jaraĝa, unu el la unuaj esperantistoj, Sveda kunfondinto de la Sveda Federacio Julio 1943.

**Horncastle** F-ino Florence, 74 aĝa, 25. V. 42 en Croydon, Britujo, dumviva anino de IEL kaj estinta anino de UEA.

**Horne** James Barr, 22. XI. 1940, longjara ano de UEA kaj laste Del. de IEL, en Glasgow, Skotl.

**Hübner** Prof. D-ro. en Schweidnitz, Silezio, malnova ano de UEA iama Delegito en sama loko, preskaŭ 90 jara. 10. III. 40.

**Jamieson** Fergus Fr., 25 jaraĝa, Glasgow. 2. IV. 1941.

**Janisch** Emil, en Praha. 22. II. 1940, ano de UEA dum kelkaj jaroj.

**Ilić** S-ino Draga, jugoslava poetino kaj verkistino, 24. VII. 42, Beograd

**Iliev** Vasil Iv., membro de la E-societo en Sofia, redaktinto de esp. paĝo en la poŝtoficista gazeto.

**Ilton** Claude James, Novzelando, akcidente la 12. IV. 1941 en montaro.

**Inman** F-ino Maud, en Halstead, 93 jaraĝa, 23. IV. 1941, Esperantistino de 1907. Tradukis „Gulivero en Liliputlando".

**Jones** F-ino Mair, 1945, Cardiff (Britujo)

**Karpatakis** Georges, en Port-Said, tre agema samideano, trafita de bombo dum aeratako. Aŭgusto 1941 kune kun la patrino.

**Kelly** Patrick T., en Alford. Blinda ĵurnalisto, kiu dum la Varsovia kongreso kantis en la pola radio.

**Keyzlarova** S-ino Berta, fidela anino & Del. de UEA en Cerveny Kostelec, Ĉ. S. R., † 10. II. 1941.

**von Köppen** Vladimir, Prof. D-ro, 94 jara en Graz (Aŭgusto 1940). Filo de la rusa etnologo **P. J. von** Köppen, li naskiĝis 1846 en Peterburgo, kie li komencis sian riĉan fruktodonan karieron. De 1875 ĝis 1918 li apartenis al la Germana Marobservejo en Hamburg (Deutsche Seewarte) kaj redaktis de 1884 ĝis 1891 la germanan Meteorologian Revuon kaj de 1892 ĝis 1894 la „Annalojn de l' Hidrografio kaj mara Meterorologio". Esperantisto & kunlaborinto al la estinta „Scienca Revuo", eldonita de René de Saussure. Li verkis aron da artikoloj sciencaj el kiuj aperis aparte „Fonetika skizo de kvar ĉefaj lingvoj Eŭropaj" kaj „Propono esprimi ĉiujn mezurojn de premo atmosfera per ĝeneralaj mezurunuoj de fortoj". Malnova ano de UEA (18274) li ankoraŭ rilatis kun la redakcio de nia gazeto en jaro 1934, sendinte valoregan artikolon sciencan „Periodeco de la sociaj revolucioj".

**Kolomer** S-ro, Lille, mortpafita per la okupaciantoj, sekve de denunco.

**Kristofferson** Jakob, Mariestad, Svedl. (Sen dato).

**Krousova,** Marie, F-ino, el Ĉeské Budejovice, ekzekutita en Tabor, Ĉ. S. R., (Dato ne konata).

**Kun** Stefano, 24. III. 1942, Budapest. Prezidinto de Laborista sekcio de la Hungara E-Federacio.